

Philippe Suchard (1) fondinto de ĉokolad-fabriko. Lia jun-aĝo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-846/335, 1979 decembro 27 kaj 29

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-51/SRI-1979-51-A-2-335-846-1979-12-27-29-Claude-kaj-Andree-Gacond-Philippe-Suchard-1-fondinto-de-ĉokolad-fabriko-lia-jun-aghoo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉokolado estas varo, kiu karakterizas unu el la tipaj produktoj de la svisa industrio. Inter la plej konataj markoi menciindas la nomo Suchard aŭ suŝard, ĉu ni ĝin prononcas franclingve aŭ laŭ la esperanta fonetiko.

A.- La ĉoko1ad-fabrikon Suchard kreis en 1826 en la vilaĝo Serrière apud Neuchâtel juna kaj entreprenema sukeraĵisto nomata Philippe Suchard. La sukceso de lia entrepreno ne nur estas rezulto de komerca talento, sed ankaŭ de neordinara laboremo kaj de sprita vigleco, de karaktero eksterordinara kaj de filantropa avangardismo. Kiam oni legas la raportojn, kiujn Philippe Suchard faris pri siaj vojaĝoj en Usono kaj ĉirkaŭ la mondo, oni konscias, ke li estis bona observanto kaj agrabla rakontanto. Liaj sciencaj eseoj pri la korektado de la akvonivelo de la lagoj Neuchâtel, Biel kaj Murten malkovrigas la klarvidulon. Fakte la vivo de Philippe Suchard estas raportinda. Ĝi spegulas hom-tipon, tiun de la grandaj industri-pioniroj.

Cl.- Philippe Suchard naskiĝis la 9-an de oktobro 1797 en la urbeto Boudry, proksime de Neuchâtel. Lia patro estris kafejon. Tri jarojn antaŭe li forlasis la urbon La Chaux-de-Fonds, kiun ĵus detruis ruiniga incendio. En ĝi li estis perdinta sian tutan havaĵon de tuk-vendisto. Estis do kiel rifuĝinto, ke Guillaume Suchard instaligis kun sia familio en Boudry, kie sin prezentis laborebleco. Kiel ni povas imagi, la infanecon de Philippe Suchard karakterizis malriĉeco, laboro kaj pro kamparanaj okupoj neregula frekventado de la vilaĝa lernejo.

A.- La familian hejmon Philippe Suchard forlasis je la 15-a jaro por iri pergajni la vivon en Lenzburg kiel dommastruma helpanto ĉe pastoro. Dum tri jaroj li tie lernis la germanan lingvon.

Cl.- En 1815 li iris vivi en Berno ĉe frato nomata Frederic, kiu estis fondinta sukeraĵejon. Tiu ĉi magazeno famiĝis pro siaj mielkukoj. Ok jarojn Philippe Suchard restis tie, lernante la sukeraĵistan profesion kaj ŝparante monon. La labortagoj estis longaj, ili daŭris dekkvar horojn.

A.- Philippe Suchard, per la mono, kiun li gajnis en Berno, tio estas ses mil frankoj, decidis iri viziti Usonon. Aperis libro pri tiu vojaĝo unue en la germana lingvo, ĉar la argaŭa verkisto Heinrich Zschokke, pasiigita pro la raporto, tuj trovis eldoniston. La franca originalo aperis kvardek jarojn poste sub la titolo: "Un voyage aux Etats-Unis d'Amérique, notes d'un touriste pendant l'été et l'automne de 1824." Esperantigo: Vojaĝo en Usono, notoj de turisto dum la somero kaj aŭtuno 1824-a.

Cl.- Kiel diras la titolo de tiu turista raporto, Philippe Suchard fakte nur kelkajn monatojn zigzagis tra Usono. Forlasinta Svislandon fine de majo 1824, jam komence de decembro de la sama jaro li denove estis hejme.

A.- En alia vojaĝ-raporto titolita "Le tour du monde en grande vitesse", "Rondiro ĉirkaŭ la mondo en granda rapido" Philippe Suchard tiel priskribas sian manieron vojaĝi:

Cl.- "Oni riproĉas al mi, ke mi vojaĝas tro rapide. La realo estas, ke mi malfacile komprenas la turistojn, kiuj eterniĝas en urbo aŭ antaŭ pejzaĝo. Time is money diras la angloj. Tempo estas valorega varo, kaj la vivo tiel mallongas, ke mi ne ŝatas perdi la mian, nek trouzi tiun de la aliaj. Tuj kiam mi vidis pasante tion, kio, en loko loĝata aŭ ne, ŝajnas al mi atentinda, mi sentas en mi foriran senpaciencon, kiu ne plu lasas al mi ĝuplezuron por io ajn."

A.- Fakte Philippe Suchard havis raportistan talenton. Liaj turistaj notoj restis legindaj, pro tio lia vojaĝo en Usono reaperis en 1947 okaze de la 150-a naskiĝjaro, kaj tiu ĉi verko revekis intereson. Estas neimageble kiom da observaĵoj la rapidema Suchard notis dum siaj senĉesaj kuroj. Li devis esti nelacigebla kaj akraŭda vojaĝanto.

Cl.- Jen por doni al vi ideon pri la rakont-maniero de Philippe Suchard eroj el la 12-a ĉapitro titolita "Kelkaj semajnoj en la kamparo de la ŝtato Ohio":

A.- "La postan tagon ni fine alvenis dum la posttagmezo ĉe la patra hejmo de miaj gastigantoj ... La posedanto de tiu entrepreno min akceptis kun komplezema boneco kaj la plej afabla gastamo. Mi baldaŭ sentis min ĉe li kiel hejme. Ni migradis en la ĉirkaŭaĵoj, vizitis liajn bienojn kaj kune ĉasadis, aktiveco tie ĉi ege varia kaj riĉega, ĉefe je meleagroj. Vintre oni povas eĉ ilin mortigi per simplaj bastonoj. La kapitano rakontis, ke en nura sezono li mortigis el ili pli ol dekduo proksime de la domo, ĉiu pezis inter dekok kaj dudek pundoj. Io ankoraŭ pli komuna fariĝas en tiu ĉi regiono vera plago, tio estas speco de sciuroj, kiuj estas kvarfoje pli grandaj ol tiuj, kiujn ni havas en Eŭropo. Gruppe ili kapablas en unu sola tago vori plurajn akrojn da maizkampoj. Pro tio oni senĉese alĉasas ilin; sed ili estas malfacile detruiblaj: ili rapide multiĝas kaj krome posedas tiel potencon vivoforton ke, se oni ne atingas ilin unufrape ĉe la koro aŭ kapo, ili forsaltas de branĉo al branĉo, de arbo al arbo, kaj eskapas, malgraŭ la rompitaĵoj membroj. Oni manĝas ilin; ilia viando estas agrabla, nutra kaj mola. Oni alĉasas ankaŭ damaojn, lutrojn, oposumojn, rakunojn kaj aliajn bestojn de tiu specio."

Cl.- Poste Philippe Suchard priskribas tre atente la kamparanan vivon, la pejzaĝon, la arbarojn, la manieron eltiri sukeron el acerarboj kaj la koloniigon de tiu regiono.

A.- Tuj post sia reveno en Neuchâtel, Philippe Suchard reprenis sian antaŭan okupon. Li fondis en Neuchâtel sukeraĵejon kaj en tiu ĉi magazeno li komencis fabrikii ĉokoladon. Reklamo aperinta en la taggazeto anoncis la 17-an de novembro 1825, ke en la magazeno Suchard estas aĉeteblaj novaj desertaĵoj kaj fajna ĉokolado fabrikita piste kiel tiu de sinjoro Dufour en Goumoens per karaka kakao kaj rafinita sukero.

Cl.- La venontan semajnon ni raportos pri la rapida disvolviĝo de la entrepreno de Philippe Suchard.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond parolis pri la juneco de Philippe Suchard. Ĝis reaŭdo!